

Kiel uzi la Vortlernigilo

La Antaŭekzameno

- 1 Antaŭ ĉio, iru al la paĝo *1 kaj faru Ekzamenon 1 (la Antaŭekzamenon). Ne gravas se vi trovas la ekzamenon ege malfacila. La ĉefa afero estas fari ĝin por, ke vi havu ĝeneralan ideon pri via nivelo antaŭ ol komenci la Vortlernigilon.
- 2 Post kiam vi skribis la respondojn por la cent demandoj de la antaŭekzameno, kontrolu viajn respondojn sur paĝo *77.
- 3 Kalkulu vian poentaron. Estas facile: 24 bonaj respondoj egalas 24 procentojn. 52 bonaj respondoj egalas 52 procentojn kaj tiel plu.
- 4 Skribu vian poentaron sur paĝo *8. Vi ankaŭ povas indiki vian rezulton sur la grafikajo. Notu, ke estas 10 ekzamenoj entute. Ne faru la 9 aliajn nun. Vi faros ilin laŭlonge de via lernado.

La Unua Sekcio

- 5 Post via antaŭekzameno, vi estas preta komenci lerni vortojn per la Vortlernigilo. Por scii kiel uzi la sistemon, iru al paĝo 3* por vidi la sekvendajn paŝojn.
- 6 Faru nur la unuan sekcion. Tio estas, studu la vortojn inter 1 kaj 155. Vorto 1 troviĝas sur paĝo 9*, kaj vorto 155 estas sur paĝo 40*.
- 7 Fininte la Unuan Sekcion, faru la duan Ekzamenon.
- 8 Poste, kontrolu viajn respondojn sur paĝo *77, kalkulu vian poentaron, skribu vian rezulton sur paĝo 9*, indiku vian procentaĵon sur la grafikajo.
- 9 Nun vi estas preta fari la sekvan sekcion.

La aliaj sekcioj, kaj la Postekzameno.

- 10 Daŭrigu, farante la Trian Sekcion. Post tio, la duan Dumekzamenon.
- 11 Ripetu la ciklon de Sekcio + Dumekzameno ĝis la fino de la libro.